

LA SALTEJO



Kongresa Kuriero de la 104-a Universala Kongreso de Esperanto

Vendredon, la 26-an de julio 2019

n-ro 6

Redaktas: Jukka Pietiläinen

kongresakuriero2019@gmail.com

Programŝanĝoj vendrede

Vendredo 10h30-12h00, Vinilkosmo diskutrondo - Onta fermo de Vinilkosmo: novaj defioj por retaliro al E-muziko, Setälä {NOVA}

Notu, ke la programeroj **Aŭkcio** kaj **Venontaj Kongresaj** okazos en salono **Hodler**.

Venontaj Kongresoj, 15h00-16h00 en salono Hodler.

Aŭkcio 16h30-18h00 en salono Hodler.

Ekstra **finna eksprese** okazos vendrede je la 10h30 en salono **Vilkki** en la lernejo Salpaus.

Atentu la orgenkoncerton

Okazos orgenkoncerto en preĝejo Ristin kirkko, vendrede (hodiaŭ). Adreso: Kirkkokatu 4. Koncertos Adriano Falcioni el Italio.

La koncerto komenciĝos je la 14-a horo. Nuliĝis komuna konatiĝo kun la preĝejo antaŭ la koncerto; okazos nur mallonga prezento je la 14-a horo kaj post tio komenciĝos la koncerto.

Enirbileto kostas 10 eŭrojn, eblas pagi aŭ kontante aŭ per karto.

Financa Kunsido

Ĉu vi interesiĝas pri la financoj de UEA? Ĉu vi havas ideojn kiujn vi volas kunhavigi? La financa komisiono de UEA volas renkonti vin! UEA estas via asocio, kaj viaj ideoj kaj kontribuoj tre gravas!

Venu vendredon ĉe Leivo-Larsson, 14h30 - 16h00 (notu: loko malsama ol en La Saltejo 5).

La Komisiono pri Financo de UEA

Renato Corsetti KN 23

Ben Indestege KN 776

Francesco Maurelli KN 359

E-teamo gajnis futbalmatĉon

Ĵaŭde okazis la jam tradicia futbalmatĉo inter Esperanto-teamo kaj loka futbala teamo. Ĉi-jare gajnis esperanta teamo. La loka teamo estis *Tiinan tiikerit*. Ambaŭ teamoj estis sekse miksitaj. La rezulto estis 5-2.

Ni elkore dankas s-inon Clara Bracke, el Belgio, por la ĵus ricevita mondonaco al la futbalmatĉo de la 104-a UK!

Kion vi povas fari por UEA?

Komence de aprilo 2019 pasis la 60-jariĝo de la unua profesia E-Redakcio, tiu de Pola Radio. Ĝiajn tradiciojn de 11 jaroj daŭrigas Pola RetRadio en Esperanto. La Lahtia UK signas tiel la 60-jariĝon de la prikongresa raportado inaŭgurita en 1959. Pri tio en la komenco de la renkontiĝo de AERA informis Barbara Pietrzak. La renkontiĝo kun kvindekdeko da aŭskultantoj kaj radioamikoj alprenis la formon de dialogo inter reprezentanto de Pola RetRadio kaj de la podkasto Kern.punkto.info, Johannes Mueller. Ĝi i.a. traktis la informan priservadon de la E-komunumo per informoj kaj raportoj ligitaj kun la funkciado de UEA.

Pola RetRadio (www.pola-retradio.org) daŭrigas informlaboron serve al UEA al forestantaj en Lahtio esperantistoj ankaŭ dum la 104 UK. En ĝia retejo troviĝas jam kvin ĉirkaŭ 20-minutaj raportoj rekte elsenditaj el la kongresurbo. Krom la raportoj dum la kongresa semajno multaj rilataj sondokumentoj, intervjuoj aŭdiĝos en ĝiaj elsendoj dum la postkongresa periodo.

Red. Barbara Pietrzak

Nefumantoj pri pulmkancero

TADEN (nefumantoj) kunsidis en Kavka marde ekde la 13-a horo. Kunvenis 7-opo el 4 landoj, nur nefumantoj. Unu el la sep konsilis alvoki ĝuste financajn konsciojn pri la neceso ĉesi fumi. La estrarano RM (37) menciis la averton de MOS (Monda Organizo por Sano) pri la danĝero de pulmkancero. Laŭ tio la Eŭropa komisiono urĝis siajn Ŝtatojn-Membrojn fari leĝojn por malstimuli fumadon kaj malakceptigi tiun kontaĝan konduton en la socio.

Ni ankaŭ diskutis pri elektronika cigaredo, unu el la temoj de jam fluparola d-rino Margareta Zaleski-Zamenhof. En Nederlando subministro pri sano ĝin malpermesis pro malfacila distingeblo kontraŭ vera cigaredo, sed ĉefe ĉar "vidi fumi igas fumi".

Centoj da ekzempleroj de la organo "Puraj Pulmoj" restas nedisdonitaj. Eblas mesaĝ-peti numeron de moerbeekr@gmail.com KN 37

Ateistoj pri festoj

30-40 homoj partoprenis la kunvenon de ATEO (Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo) mardon posttagmeze en salono Konisi. La temo estis "Festado por ateistoj", kaj oni diskutis, kiel festi la gravajn okazojn de la vivo (naskon, plenaĝiĝon, geedziĝon kaj morton/funebradon) en nereligia maniero.

Bernard Behra, Dieter Rooke, Anna Löwenstein kaj Probal Dasgupta enkondukis la temon per mallongaj prezentoj. Probal informis, ke fronte al simila demando en sia lerneja/universitata komunumo ekde 1900 la barata poeto-kantverkisto-eduknoviganto Tagore lanĉis laikajn festivalojn, nutrante ilin per komponaĵoj siaj; ili restas vivantaj kaj allogaj. Post tiu prezento ankaŭ la ĉeestantoj kontribuis per la propraj spertoj. La rezulto estis interesa kaj tre vigla kunveno.

Anna Löwenstein, KN 695

AVE pri agrikulturo

La kunvenon de AVE - fakasocio de UEA pri ekologio - partoprenis 28 homoj; Vidu ankaŭ La Saltejo 4, p. 3.

Krom la agado kun Verdaj partioj ni subtenas kelkajn el la 17 celoj de UN por daŭripova evoluo. Temas pri subteno de evoluo-projektoj de afrikaj samideanoj (edukado, salubra trinkakvo, rearbarigo, ...).

Alia grava temo estis natur-afabla agrikulturo sen pesticidoj. La verdaj EU-parlamentanoj daŭre laboras ŝanĝi la subvencio-sistemon por agrikulturo, kiu nuntempe pagas ĉefe laŭ la areo. Tiel profitas agro-konzernoj. Sed necesas subteno laŭ kvalito: salubra nutraĵo, savi humuson kaj grundakvon, kaj vivteni naturan biodiversecon (insektoj, abeloj, birdoj, k.t.p..)

Ĉi-rilate Elizabeth prezentis peticion al la franca registaro malpermesi ĉiujn agropesticidojn > www.nousvoulonsdescoquelicots.org, aŭ de alia lando serĉu: pesticid .

Ĉi tiuj papavetoj estis tipa trudherbo en grenokampoj, bezonata de insektoj. Vizitu: verduloj.org

Manfred Westermayer, kn. 254

Kalevala al Esperantujo

Esperanto-Asocio de Finnlando donacis ekzempleron de la finna nacia epopeo Kalevala al ĉiu kongresano.

Se vi volas kaj povas kunporti plia(j)n ekzemplero(j)n al via asocio, klubo, biblioteko (ankaŭ publika en via urbo) ni donos tiu(j)n ĉe la akceptejo. Por donaco, ne revendado. Kore EAF.

Tuomo Grundström – KN 63

Falsaj Novaĵoj: Partoprenu en Studo kaj Spertiĝu

La Universitato de Kembriĝo lanĉis novan sciencon esploron pri falsaj novaĵoj. Unika estas ke Esperanto estas uzata kiel ĉefa lingvo por faciligi kulturan komparon. Por pruvi ke Esperanto utilas en la scienca mondo, ni bezonas pliajn partoprenantojn. Iru al www.Misinformato.net kaj partoprenu. Ĝi konsistas el 15-minuta ludo en kiu vi mem kreas falsajn novaĵojn, kaj dume spertiĝas. Pli da informoj:

mail@rakoen.be / KN 113

Kongresa limeriko, versio 1

En Lahti abundis aranĝoj

Kaj ankaŭ ekskursoj kun manĝoj

En saŭna veter'.

Sed ĉefa afer':

Atenti pri la programŝanĝoj!

Otto Prytz, KN 880

Intervjuo kun Global Voices-volontulino Manuela Burghilea



- Ĉu vi povas prezenti vin?

- Mi estas Manuela Burghilea, mi devenas de Rumanio, mi nuntempe estas TEJO-volontulo en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo kaj mi estas kunadministranto de Global Voices Esperanto (Tutmondaj Voĉoj). Kaj mi baldaŭ komencos doktoriĝon en Skotlando en la universitato de St Andrews.

- Kaj vi ankaŭ estis en alia lando en Eŭropo.

- Mi volontulis en la Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo kaj mi ankaŭ iomete esperantumis en Brazilo.

- Kiom da lingvoj vi parolas?

- Mia denaska lingvo estas la rumana. Mi studis la francan kaj la germanan en la universitato de Bukaresto. Nuntempe mi parolas Esperanton en la CO ĉiutage, sed antaŭe mi ankaŭ studis la hispanan kaj la anglan. Ekde septembro mi devos denove reveni al la angla.

- Kaj nun, bonvolu paroli pri Global Voices.

- Global Voices, aŭ Tutmondaj Voĉoj, estas civitana retejo kun novaĵoj el la tuta mondo, malpli aŭdataj en la internaciaj medioj. Ni ĉefe uzas rakontojn kiuj aperas en sociaj medioj por fari novaĵojn kaj ni tradukas en kvardekon da lingvoj, inkluzive de Esperanto. La projekto Global Voices komenciĝis en 2004 kaj la esperanta sekcio naskiĝis en 2013. Ĝi iĝis pli aktiva ĝuste tiun ĉi jaron ĉar Global Voices iĝis oficiala partnero de la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj. Nia esperanta teamo ankaŭ partoprenas tiun ĉi kampanjon tradukante.

- Kiel eblas ke la novaĵoj aperu en Esperanto?

- Global Voices ne funkcias sen volontuloj, ĝi estas volontula retejo kaj ni bezonas kontribuantojn daŭre,

ĉefe tradukistojn kaj provlegantojn kun bona scipovo de Esperanto. Vi povas aliĝi interrete. Vi povas elekti artikolojn kiujn vi ŝatus traduki, pri diversaj temoj: homaj rajtoj, naturmedio, indiĝenoj kaj interreta aktivismo, interalie.

- Al kiu la personoj povas turni sin se ili kapablas kaj pretas helpi al vi?

- Nia kontakto troviĝas ĉe nia retejo globalvoices.org. Esperanto estas unu el la kvardek lingvoj disponeblaj kaj unu el la plej viglaj lingvaj sekcioj de la retejo, pro tio ĝi videblas en la unua linio kun la plej viglaj sekcioj. Ni invitas vin konatiĝi kun nia retejo kaj niaj novaĵoj. Ĉe nia paĝo disponeblas reta aliĝilo, plenigu ĝin kaj unu el niaj administrantoj kontaktos vin.

Intervjuis: Mireille Grosjean, KN 342

Novaj aliĝoj

914 Aleksandra Gabrilo, BR

915 Wong Zerlina

916 Jeffrey Li

917 Guo Xinyi, CN

El Esperanto-historio de Lahtio

La nova Esperanto-klubo estis fondita en Lahtio en la jaro 1968. Entute 14 personoj partoprenis la fandan kunsidon kaj la agadon aktivigis la Universala Kongreso en Helsinko en 1968. En la agado de la klubo partoprenis entute 61 personoj. En la 1970-aj jaroj la membronombro estis 32, kaj la meza aĝo estis 44 jaroj.

La klubo organizis plurajn kursojn, eĉ en la plej grandaj laborlokoj. Klubanoj partoprenis aktive vojaĝojn al la kongresoj kaj vizitojn al ĝemelurboj. Ankaŭ la urbo subtenis finance la agadon. En 1988, por la 20-jara festo de la klubo, venis esperantistoj el multaj landoj, eĉ el la Sovetunia ĝemelurbo Zaporijō.

La intereso al Esperanto komencis malkreski en la 1980-aj jaroj. Post 1989 ne plu okazis kursoj en institucia nivelo. Dum la preparlaboroj por la UK en Tampere en 1995 estis organizita tri prepareseminarioj en Lahtio. La klubo estis formale malfondita en la jaro 2007, kiam la membronombro falis ĝis 15.

JP

Foto-ekspozicio Kroatio: La lando de mirinda naturo

Dum la antaŭaj du kongresoj *Kroata Esperantista Unuiĝo* dum la Universalaj kongresoj prezentis ekspozicion, kiu teme rilatis al la kroata kultura havaĵo en la listoj de UNESKO.

Normale, temis pri la fotoj, kiujn faris la membroj de KEU.

Ĉi-jara UK teme ligiĝas al la naturo kaj kulturo. Tial ni decidis pretigi novan ekspozicion, per kiu oni montros la mirindan naturon de Kroatio.

Al la ekspozicio kontribuis naŭ membroj de KEU. Iuj motivoj estas vaste konataj, ekz. la Lagoj de Plitvice. Unu el la aŭtoroj elektis iom nekutimajn motivojn, la vintrajn. Pluraj fotoj montras la maron, ĉar Kroatio estas konata pro ĝi. Sed ne mankas la verdaĵoj de Slavonio. Fakte, la motivoj estas de Istrio en okcidento ĝis Slavonio en oriento, de Zagrebo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo en la nordo ĝis Dalmatio en la sudo.

Por la aŭtoroj ĉiu foto alportas apartan rakonton, rememorojn kaj por vi espereble ĝuon.

La ekspozicio kiel tuto donas nekutiman bildon pri la lando, por kiu vi certe konkludos ke temas pri lando de mirinda naturo kiun indas viziti! Bonvenon!

Elekto kaj aranĝo: *Marija BELOŠEVIĆ (kn 137)*.

Aŭtoroj de la fotoj estas membroj de la Kroata Esperantista Unuiĝo: *Krešimir Belošević, Marija Belošević, Ratimir Delorko, Vera Fabris, Željko Grganić, Ivica Jurišić, Vedran Odeljan, Gordana Plavšić I, Jelica Stipanićev Mustapić*.

Loko: enira halo

Legantoj kaj aĉetantoj! Fundamenta rekomendo!

Por la esperantisto kiu jam aĉetis ĉiujn ne kutimajn librojn – kaj por la esperantisto kiu eĉ ne posedas Esperanto-libron, ni aliĝas al la propono de esperantologo André Cherpillod: “Legu la *Fundamenton*. Tiel multaj estas la esperantistoj, kiuj ne konas ĝin... Eĉ ĉe la akademianoj...” Jen granda defio! Rapidu al la Libroservo kaj aĉetu tiun Zamenhofan verkon en eldono redaktita de akademiano André Albault (2007).

Kielinurkka – Lingva angulo

Kiom da?

Ha-lu-ai-sin... : Mi volus havi...

...yh-den kah-vin, kii-tos : ...unu kafon, bonvolu

...kak-si kir-jaa, kiitos : ...du librojn, bonvolu

...kol-me kas-si-a... : ...tri sakojn...

...nel-jä o-lut-ta... : ...kvar bierojn...

...vii-si pul-la-a... : ...kvin bulkojn...

...kuu-si pul-lo-a lim-saa... : ...ses botelojn da refreŝigaĵoj (trinkaĵoj)...

...seit-se-män pa-ket-ti-a kek-se-jä... : ...sep paketojn da biskvitoj...

...kah-dek-san ky-nä-ä... : ...ok skribilojn... (plumojn aŭ kraĵojn)

...yh-dek-sän ys-tä-vä-ä... : ...naŭ amikojn...

...kym-me-nen eu-ro-a... : ...dek eŭrojn...

Kiom kostas?

Leipä mak-saa kaksi euroa : La pano kostas du eŭrojn.

Juus-to maksaa neljä vii-si-kym-men-tä : La fromaĝo kostas kvar (eŭrojn) kvindek (cendojn)

Notu, ke en la finna ekzistas neniu artikolo (same kiel ekzemple en la pola), plej ofte la kunteksto sufiĉas. Kiam oni parolas pri prezoj, oni ofte forlasas vortojn "eŭrojn" kaj "cendojn" kaj anstataŭe havas mallongan paŭzon inter la du nombroj.

Montraj pronomoj

Se oni devas precizigi pri kiu objekto temas, oni uzas montrajn pronomojn, tabelvortojn. La finna havas sistemon kun tri distancoj same kiel ekzemple la japana.

Tä-mä olut mais-tuu hy-väl-tä : Ĉi tiu biero bongustas (la biero estas ĉe mi)

Tuo sii-de-ri ei ol-lut hyvää : Tiu cidro ne bongustis (la cidro estas ĉe ci aŭ vi)

Se on väärä ovi : Ĝi estas malĝusta pordo (la pordo estas nek ĉe mi nek ĉe ci aŭ vi, alie)

Nä-mä ovat vii-mei-set kap-pa-leet : Ĉi tiuj estas la lastaj ekzempleroj (ĉe mi)

Nuo so-pi-vat mai-ni-os-ti : Tiuj estas tre taŭgaj aŭ tiuj vestaĵoj bone sidas (ĉe ci aŭ vi).

Notu, ke la vorto por pantalono, "*hou-sut*", ĉiam estas plurala kaj ĉi tial oni uzas pluralan formon de la montra pronomo.

Ne ovat ihanat! : Ili estas ĉarmaj aŭ belegaj! (alie)

Julkaisija: Suomen Esperantoliitto ry.